

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

KONTRIBUO DE UKRAINIDEVENAJ JUDOJ AL ESTABLO DE ISRAELO (pĝ 11)



SOLVO DE AMUZA MATEMATIKA TASKO

(de N^o166, pĝ 19)

La unua ekvacio. Tri paroj da sportaj ŝuoj egalas al 30. Sekve unu ŝuo “kostas” 5 poentojn. **La dua ekvacio.** Hometo + hometo + 2 ŝuoj egalas al 20. De 20 ni minusu 2 ŝuojn (10) kaj evidentiĝas, ke unu hometo “kostas” 5 poentojn. **La tria ekvacio.** Kvar pakajetoj kun heliantaj semoj + hometo = 13. $13 - 5 = 8 : 4 = 2$. Unu pakajeto kun la semoj “kostas” 2 poentojn. **La kvara ekvacio.** Ĝuste ĉi tie komenĉiĝas la plej interesa. Unue, mi ŝatus memori al tiuj, kiuj ne tre bone memoras matematikajn regulon, ke komence necesas fari multiplikon kaj dividon kaj nur post tio - adicon kaj subtrahon.

Do, ni komencu solvi la kvaran ekvacion. Ni tre atente rigardu la hometon: li mem “kostas” 5 + 2 pakajetoj (4 poentoj) = 9. Poste rigardu, kio estas sur liaj piedoj - 2 sportŝuoj (10 poentoj). Do la tuta hometo sume “kostas” jam 19 poentojn, kiujn necesas multipliki je 2 (la pakajeto), kio donas al ni 38 poentojn kaj adicii 1 ŝuon (5). Do, ni ricevis finan rezulton - 43! Se iu mem venis al la sumo - gratulojn!!!

UTILA EKZERCO

Flava, nigra, ruĝa, verda

Blua, ruĝa, flava, nigra

Nigra, flava, ruĝa, verda

Ruĝa, nigra, verda, blua

Blua, verda, flava, ruĝa

Flava, ruĝa, nigra, ruĝa

Kiel vi vidas, sur la bildo estas 24 vortoj, skribitaj diveskoloro.

Necesas laŭte nomi koloron, per kiu estas skribita la vorto.

Faru tion ĝis la lasta vorto kaj poste ripetu tion maldirekte.

Tiunmaniere vi trejniĝos ambaŭ cerbajn hemisferojn,

unu el kiuj respondecas pri legado kaj la dua -

pri percepto de koloroj.

La redaktoro
Mikaelo Lineckij

La reviziantoj:
Gabi Zeevi
Andreo Peçonkin

ELI-Prezidanto
Amri Wandel

La redakcia adreso:
mikaelo@esperanto.org.il

La retejo:
<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaŝigo:
Mikaelo Lineckij

Abontarifo eksterlanda: 10 eŭroj.
Eblas pagi per UEA-konto elia-q
aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

ISSN - 1565 3315

Karaj legantoj,

Ĉi numere vi povos legi pri: la solena vespero, dediĉita al 159-jariĝo de nia kara Majstro, pri saĝaj pensoj de Noam Chomski (Ĥomski), pri V.Eroŝenko, k.a. Bedaŭrinde printempe ne abundas E-aranĝoj, pro tio en la numero estas aliaj interesajoj. **Se vi volas legi interesan gazeton, sendu al la redakcio interesajn materialojn!**

La enhavo:

- | | |
|---|-------------|
| 3. Grava kunveno la 11.12.2018..... | A.Wandel |
| 4. Amos Oz | A.Wandel |
| 5. Noam Chomsky..... | M.Lineckij |
| 8. Vespero omaĝe al J.Murĵan | A.Wandel |
| 9. Se vi forestas... .. | Ju.Norŝtejn |
| 11. Kontribuo de ukrainidevenaj judoj..... | M.Lineckij |
| 19. Sorto de Vasil Eroŝenko..... | Ju.Patlan |
| 23. Literatura suplemento (LitSupo) | M.Lineckij |
| 23. Kurtaj rakontoj | Steve Moss |
| 25. Rido = sano | M.Lineckij |
| 28. Solvo de la tasko kaj utila ekzerco | M.Lineckij |

Ĉio en nia vivo subiĝas al ĝiaj neŝanceleblaj leĝoj.

Okazas ekzameno pri logiko.

Profesoro:

- En aviadilo estas ŝarĝe 500 brikoj. Unu briko falis el la aviadilo. Kiom da brikoj restis en la aviadilo?

Studento:

- Nu, tio estas facila! 499!

- Ĝuste. La sekva demando. Kiel per tri movoj meti elefanton en fridujon?

- 1. Malfermi la fridujon. 2. Enmeti la elefanton. 3. Fermi la fridujon.

- Bone, ni daŭrigu. Kiel per kvar movoj enmeti cervon en fridujon?

- 1. Malfermi la fridujon. 2. Elmeti la elefanton. 3. Enmeti la cervon.

4. Fermi la fridujon.

- Bonege! Leono, reĝo de bestoj havas naskiĝfeston! Gratuli ĝin venis ĉiuj bestoj, krom unu. Kial?

- Ĉar la cervo daŭre restas en la fridujo.

- Perfekte! – diras la profesoro. – Ni rezonu plu. Ĉu povas avinjo tra-iri rivereton, en kiu svarmas krokodiloj?

- Certe povas! Ja ĉiuj krokodiloj foriris al la naskiĝfesto de la leono.

- Bone. Kaj nun lasta demando. La avinjo trairis la rivereton, tamen ŝi mortis. Kio okazis al ŝi?

- Hmmm... nu-u-u-u... Eble pro plena elĉerpiĝo de la fortoj, ĉu?

- Ne, ĉi foje vi eraris - ŝian kapon trafis briko, falinta el la aviadilo - do - vi fiaskis pri la ekzameno. Venu sekvafoje por la reekzameniĝo!

La tradukoj de M.Lineckij.

Vintro en Israelo

Nordo (Golan-montetoj)



Sudo (Oranĝejo)



La avo, krom tio estas granda komercisto, diras al la sekretariino: “Mia nepo havos tutan semajnon, kiun li volas dediĉi al mi. La oficvojaĝo estas nuligita. Ni veturos pli poste”. La sekretariino telefonas al la edzo: “La ĉefo prokrastigis la oficvojaĝon”. La edzo telefonas al la amorantino: “Ni ne bonŝancis – la edzino ne forveturos”. La amorantino telefonas al la lernanto: “La lecionoj estos laŭ la plano”. La lernanto informas la avon: “Nia plano pri kuna pasigo de la tempo fiaskis – la instruistino resaniĝis”. La komercisto vokas la sekretariinon: “... tamen ni veturu...”

VERA AMO

Mozes Mendelson, avo de fama germana komponisto, estis tute nebela. Krom la nealteco lin malbeligis groteska ĝibo. Foje li gastis ĉe hamburga komercisto, kiu havis ĉarman filinon. Mozes senespere enamiĝis al la junulino, tamen lia malbela aspekto abomenigis ŝin.

Kiam venis la tempo forveturi, Mozes kuraĝiĝis supreniri en ŝian ĉambron, por uzi la lastan eblon paroli al la amatino. Ŝi estis ĉarma kiel anĝelo, tamen ŝi obstine ne volis rigardi al li, kio kaŭzis al li doloron. Post kelkaj sensukcesaj provoj komenci la interparolon Mozes malkuraĝe demandis:

- Diru al mi, ĉu vi kredas, ke geedziĝoj efektiviĝas en ĉielo?
- Jes, - respondis ŝi, same rigardante al planko. - Kaj vi?
- Ankaŭ mi kredas, - reeĥis li. - Vidu, ĉiufoje, kiam en la mondo aperas knabo, Dio en ĉielo anoncas al li, al kiu knabino li devos edziĝi. Kiam naskiĝis mi, ankaŭ al mi estis montrita mia estonta fianĉino, kaj Dio avertis min: “Via edzino estos ĝiba”. Kaj mi tuj ekkriis: “Ho ne, Dio mia! Virino kun ĝibo - tio estas granda tragedio! Mi petegas Vin, mia Dio, transmetu la ĝibon al mi kaj ŝi estu belulino!”

Ĉi momente la junulino unuafoje levis la okulojn al li kaj en profundo de ŝia animo movetis iu rememoro. Ŝi etendis la manon al Mendelson, kaj poste ŝi fariĝis lia amanta kaj fidela edzino.

Aldone - kontribuaĵo de Gabi Zeevi: Iu literatura eldonejo anoncis konkurson por la plej mallonga rakonto, sed ĝi devas enhavi seksecon, mistikan enigmon, amon inter riĉuloj kaj malriĉuloj, murdon. La gajninto: **“Ho, - ekkriis la almozulino, - mi estas grava! Kiu povis esti la patro, ĉu la princo, kiu hieraŭ estis murdita?”**

ZAMENHOFTAGA VESPERO

Amri Wandel

Pli ol 30 esperantistoj partoprenis la 11.12.2018 en solenaĵo, omaĝe al la Zamenhofa tago en Tel Avivo. Komence estis prelego pri Zamenhof (Amir Naor) kaj kantoj (Israela, Luiza, Enrica kaj




Doron/Amir), kaj tradicie eŭritmia dancado (Tali).

Pluraj programeroj estis prezentitaj unuafoje, kiuj entusiasmigis la spektantojn. Pluaj fotoj kaj video videblas che :

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10218091939679939>

Funkciis ankaŭ modesta libroservo, kiu, pro neaktiva aĉetado, fakte funkciis kiel ekspozicio. En la formala parto okazis diskutoj pri



la novaj kotizoj de UEA kaj repago de elspezoj (prezentis Jehoŝua), aĉeto de oficejo/klubejo en Tel-Avivo (Ŝlomo), kaj raportoj pri la agado en la pasinta jaro kaj pri la 20-Israela Kongreso en Eilat (Amri). Fine estis elektita estraro kaj kontrolkomisiono.

Pluraj partoprenintoj kaptis la okazon por **malpli koste aliĝi** al la **20-a Israela Kongreso en Eilat**.

Forpasis Amos Oz, aŭtoro de la novelo "Esperanto"


A.Wandel

(aperis en februara revuo "Esperanto")



Komence de januaro forpasis en la aĝo de 79 jaroj **Amos Oz**, unu el la plej famaj israelaj verkistoj, kiu estis plurfoje kandidato por la Nobel Premio, kaj ricevis gravajn internaciajn premiojn pri literaturo, inter ili la premiojn Gothe kaj Heine en Germanio kaj Tolstoj en Rusio. Inter liaj 38 libroj plej famiĝis "*Mia Mikaelo*" kaj "*Rakonto pri Amo kaj Mallumo*". Liaj verkoj estis tradukitaj en 46 lingvojn, i.a. ankaŭ en Esperanton. Temas pri lia antaŭlasta libro, "Inter amikoj" (2012), kun la novelo "Esperanto", kiu estis tradukita en Esperanton (de G-P. Savio kaj A.Wandel) kaj eldonita de ELI, kun la beno de Oz. Haveblas ankaŭ ĉe UEA, <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=1897>

En 2014 mi skribis al li por peti permeson traduki en E-on kaj eldoni la novelon "*Esperanto*". Ni renkontiĝis en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo, kie mi deĵoris ĉe la Esperanto-budo kaj Oz prezentis sian lastan romanon "*Judas*". Li konsentis pri la traduko kaj eldono, kaj ni interkonsentis denove renkontiĝi kiam la traduko estos preta, por ke li rakontu al mi persone pri sia speciala rilato al Esperanto.



La dua renkontiĝo okazis fine de majo 2015 en kafejo apud lia hejmo, kaj mi donacis al li kelkajn ekzemplerojn de la Esperanto-traduko de lia novelo. Li ekcitiĝis kaj tiuokaze skribis dediĉon en mian ekzempleron de "Inter amikoj", "*Al Amri Wandel, la homo kiu hejmen venigis Martin Vandenberg (la protagonisto en la novelo "Esperanto"), tre emocie, danke kaj estime, Amos Oz*" kaj cetera dediĉo en la libro "*Judas*": "*al Amri..kiu ludis miajn hebreajn vortojn per esperanto-piano...*". (Esperanto, 2015:7).

RIDO = SANO

BORIS

Vivis-loĝis en Odeso* viro, Boris. Laboris li trankvile en la firmao "Odeso-lifto" kiel riparisto. En la laborejo li estis ŝatata, ĉar li havis "orajn" manojn kaj mildan karakteron. Tiel li daŭre riparus odesajn liftojn ĝis la pensio, sed tiel okazis, ke li trafis kun la familio en Usonon en 197-iu jaro.



En tiu ora por Usono tempo sovetiaj elmigrintoj estis ne multaj. Tial en negranda loka kompanio, okupiĝanta pri riparado de liftoj, kien venis Boris dungiĝi, oni tre ekmiris. Onin mirigis la fakto, ke li venis el Sovetio kaj eĉ pli grandan miron vekis tio, ke en la angla li scipovis eĉ nek unu vorton, sed pretendis ricevi laboron.

Tamen laboron li ricevis riparinte tre malnovan kadukan lifton en domo, en kiu loĝis lia labordoninto. Kaj poste dum kelkaj sinsekvaj semajnoj Boris sukcese riparis liftojn, kiujn neniu volis eĉ tuŝi.

Estro de firmao, en kiu laboris Boris, estis tre kontenta pri tiu nova laboristo, sed unu el la distribuistinoj de la laboroj plendis al li, ke kun Boris ne eblas labori:

- Li nenion komprenas en la angla, al li nenion eblas klarigi, kion mi faru?
- Ĉio estas tre simpla, kara mia, - estis la respondo, - aŭ vi rapide ellernos la rusan, aŭ mi maldungos vin... Trovi alian distribuiston - estas nula problemo, sed trovi alian laboriston kiel Boris - vere, estas tute nereale...

PERTELEFONA MAGIA CIRKLO

Grandkomercisto vokas la sekretariinon: "Ni por semajno veturos eksterlanden". La sekretariino informas la edzon: "Karulo, mi forveturos oficejojaĝe por semajno kun la ĉefo". La edzo telefonas al la amorantino: "La edzino forveturos, ni havos tutan semajnon!". La amorantino telefonas al la privata lernanto, kiun ŝi vizitas en la hejmo: "Dum proksima semajno ni ne havos lecionojn". La knabo ĝoje telefonas al la avo: "La instruistino ekmalsanis, ni povos dum tuta semajno kune amuziĝi!"

* Odeso - sudukrainia urbo ĉe Nigra Maro.

DANKO

Lana litkovrilo, kiun oni antaŭ nelonge donis al li en bonfara fonduso, komforte kovris liajn ŝultrojn. Kaj ŝuoj, kiujn li hodiaŭ trovis en rubujo, ne premis la piedojn, tute ne premis.

La strataj lanternoj agrable varmigis la animon post tiu malvarmiga mallumo... Kurbaĵo de benko en la parko ŝajnis tiom konata por lia laciĝinta maljuneca dorso.

“Dankon al Vi, Dio, - pensis li, - la vivo estas rava!”

Andrew E. Hant

LA SORTO

Estis nur unu eliro, ĉar niaj vivoj tiel interplektiĝis je tiom implikita nodo de kolerego kaj ĝuo, ke solvi iel aliel ne eblis.

- Ni ĵetu moneron – se supros averso, ni geedziĝu; se reverso – ni disiĝu por ĉiam. La monero estas ĵetita. Falinte ĝi tintis, rotaciis kaj haltis. Averso. Ni mire rigardis ĝin. Poste, sammomente ni diris: “Eble ankoraŭfoje, ĉu?”

J.Reep

EN ĜARDENO

- Tina! Floro mia! Amo de mia vivo!

- Finfine li diris tion... - pensis ŝi. - Ho, Tom!

- Tina, mia floreto!

- Ho Tom, ankaŭ mi amas vin!

Tom proksimiĝis al ŝi, surgenuiĝis kaj rapide flankigis ŝin.

- Mia floro! Vi surpaŝis mian ŝatatan rozon!

Haupt E. Torres

SERĈANTE VERON

Finfine en tiu tute ne prizorgita soleca vilaĝeto lia serĉado sukcesis. En kaduka kabano ĉe la fajro sidis Vero.

Li neniam vidis pli maljunan kaj malbelan virinon.

- Ĉu vi estas Vero?

Olda, ŝrumpiĝinta megero solene kapjesis.

- Diru al mi, kion mi devas komuniki al la mondo? Kiun mesaĝon mi transdonu?

La oldulino kraĉis en la fajron kaj respondis:

- Diru al oni, ke mi estas juna kaj bela!

Robert Tompkins

“Optimismo – estas strategio. Elektu do mem”.

15 citaĵoj de genieca sciencisto Noam Chomsky

La biografieto.

Noam Chomsky (Ĥomski) naskiĝis en la jaro 1928 en Philadelphia en juda familio. Lia patro estis William Chomsky (1896-1977), naskiĝinta en Ukrainio kaj la patrino - Elsi Siminivskaja el Belorusio. Lingvo de la gepatroj estas la jida, tamen en la familio oni ĝin ne parolis.

Ekde 1945 N. Chomsky studis filozofion kaj lingvistikon en Pensilvania universitato. Unu el liaj instruistoj estis Zellig Kharris. Ĝuste li konsilis al Chomsky krei sisteman strukturon de iu lingvo. Ankaŭ politikaj opinioj de Kharris forte influis al Chomsky.


En la 1949 N. Chomsky edziĝis al Karol Chats, kaj ili estis kune ĝis ŝia morto (2008). Iom da tempo ili loĝis en israela kibuco. Al demando, ĉu restado en ĝi estis por li seniluziigo, li respondis, ke al li tie plaĉis, sed li ne povis toleri ideologian kaj naciisman atmosferon.

Chomsky ricevis doktoran rangon en la Pensilvana Universitato en 1955. En la disertacio li komencis evoluigi lingvistikajn ideojn, kiujn li poste priskribis en la libro “Sintaksaj strukturoj” (1957).

En 1955 oni proponis al N. Chomsky instruadon de lingvistiko en Universitato de Massachusetts, kie ekde 1961 li komencis la instruadon.

Ĝuste en tiu tempo li estis engaĝita en politikon, ekde 1964 li publike kontraŭis partoprenon de USA en la vjetnama milito, sed malgraŭ la politikumado li daŭre okupiĝas pri lingvistiko kaj instruado.

N. Chomsky-n oni nomas Einstein de la lingvistiko. Li estas unu el la plej citataj sciencistoj en la mondo. Usonanoj nomas lin “Nia Sokrato”. Geniulo de sia epoko, ĉefa intelektulo de nuntempo N. Chomsky en siaj 91 jaroj ĝis nun instruas lingvistikon en Massachusetts-a teknologia instituto, donas intervjuojn kaj verkas librojn.



Noam Chomsky

N. Chomsky estas ne simple granda scienc-lingvisto, li prezentas stilon de pensado. Jen sekvas 15 liaj la plej impresigaj citaĵoj, nepraj por kleraj homoj.

1. **Optimismo estas strategio. Se vi ne kredas, ke pli bona futuro eblas, vi neniam faros paŝon, kiu venigos al tio, ke la futuro estu pli bona. Se vi opinias, ke la espero forestas, ĝi forestos. Elektu do mem.**
2. Se ni ne kredas je libero de sinesprimado de homoj, kiujn ni malrespektas, tio signifas ke ni ne kredas je libero de sinesprimado.
3. Literaturo enhavas pli da informoj pri homa naturo ol ajna scienca teorio. Sed necesas esti singardaj. Ekzemple, se mi volas ekscii ion pri ĉina revolucio, necesas kompreni, ke al mia rilato al la lando jam influis iam legitaj libroj – ekzemple pri knabo-rikiŝisto. Necesas agnoski tion, ke ekzistas aliaj, ne malpli gravaj fontoj de informado pri la mondo ol literaturo.
4. **Se vi hodiaŭ faras la samajn lecionojn kiel antaŭ kvin jaroj, tio signifas, ke aŭ via objekto jam mortis, aŭ vi mem.**
5. Mi vidas neniun neceson formuli komplike, se eblas formuli simple. Komplikigo de io simpla – estas ŝatata ludo de intelektuloj: ju malpli kompreneble, des pli bone. Vi mem ne ĝis la fino komprenas pri kio vi parolas, sed potencon, prestiĝon kaj influon vi akiros.
6. **Legado estas ne simpla foliumado. Tio estas pripenso pri la tralegita, margenaj rimarkoj, pensaj komparoj kun aliaj libroj, serĉado de novaj ideoj aŭ metaforoj. Ne estas sencio legi, se vi simple “englutis” libron kaj post dek minutoj vi forgesas pri kio en ĝi temis. Legado de libro estas ekzerco por via menso, gimnastiko por la penso, kiu evoluigas vian imagon.**
7. Aliro al interreto estas granda bono. Tamen ties informado estas efemera kaj iluzia. Se vi ne scias ĝuste kion vi serĉas, se vi ne konservas la trovaĵojn, ne serĉas la konvenan kuntekston – konsideru vian elspezitan tempon se vi



Al mia demando al la antaŭa redaktanto: ĉu eblas aldoni al kutima revueto “Israela Esperantisto” literaturan suplementon, mi ricevis pozitivan respondon.

En la nuna numero estas precipe miaj tradukoj kaj mi alvokas la legantojn montri sian aktivecon, por ke en kaserolo de la sekva LITeratura SUPlementO (“LitSupo”) aperu ankaŭ viaj legomoj/fruktoj.

Mikaelo Lineckij, la redaktanto.

Foje redaktoro de la gazeto “New Time”, Steve Moss, decidis organizi konkurson, al partoprenantoj de kiu estis proponita verki rakonton, konsistantan el ne pli ol 55 vortoj, sed en la teksto devas esti logika suĝeto, detaligo de la personoj, kaj surpriza finalo. Li ricevis tiom da reeĥoj, ke rezulte li sukcesis kompili libreton sub la nomo “La plej kurtaĵ rakontoj en la mondo”.

Jen estas kelkaj el ili.

RENDEVUO

Telefonvoko.

- Hola, - flustris ŝi.
- Viktoria, estas mi. Ni renkontiĝu noktmeze ĉe la kajo.
- Bone, kara mia.
- Kaj, bonvolu, ne forgesu kunpreni botelon da ĉampano, - diris li.
- Mi ne forgesos, karulo. Mi volas esti kun vi ĉi nokte.
- Rapidu, mi ne havas tempon! – diris li kaj malŝaltis telefonon.
- Ŝi suspiris, poste ridetis.
- Interese, kiu estis li? - diris ŝi.

Nikol Veddl

kiel reprezentanto de Bejĝina Esperanto-Ligo. Post unu jaro EROŜENKO partoprenis en la 15a UK en Nurenbergo kaj en UK de Blindaj E-istoj. Printempe 1924 en Parizo EROŜENKO renkontiĝis kun la prezidanto de la Tutmonda Blindula Organizo. Somere de la sama jaro li partoprenas la UK-on en Vieno, dum kiu estis fondita la Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj. Ekde fino de 1924 ĝis sia morto EROŜENKO loĝis en Sovetunio. Unue li laboris kiel profesoro, poste kiel tradukisto de la japana. Kun indigno li rifuzis la proponon kunlabori kun la sovetia sekreta polico kaj spioni eksterlandanojn. Tuj post tiu rifuzo okazis problemoj kun korespondado kaj forbrulis lia arĥivo (bedaŭrinde, tio ne estis la lasta arĥivo neniiĝinta en fajro...). Pri tiu periodo en la vivo de EROŜENKO ni ne scias multon, do, devas tre ofte legi inter la linioj... En 1929 li vojaĝis al la Arkta Cirklo, al la duoninsulo Ĉukotka, kie lia frato Aleksandro loĝis kaj laboris kiel bestkuracisto. Foje unu veturo al tundro apenaŭ ne finiĝis tragike: lin trafis neĝoŝtormo, kiam li estis 70 km for de la domo, sed li estis savita de hundo, kiu trovis lin inter la neĝomontoj. La literatura rezulto de tiu aventuro estas la libro “El vivo de la ĉukĉoj”, originale verkita en Esperanto. Reveninte de la nordo, li kelkan tempon laboris kiel instruisto en porblindula lernejo sude – en Niĝgoroda provinco. Kaj poste en li vivis en Mez-Azio. Inter 1935 kaj 1945 EROŜENKO loĝis en Turkmenio, kie li fondis kaj estris la unuan internulejon por blindaj infanoj. Lerninte la turkmenan lingvon, li ellaboris reliefan brajlo-literaron, kiu poste estis agnoskita kiel la plej bona el iuj ĝistiamaj projektoj... Sed ĝis la fino de lia vivo la sovetiaj sekretaj servoj ne lasis en paco la suspektindan EROŜENKO-n, antaŭ ĉio pro Esperanto kaj pro tro memstara pensado. Kiam komenciĝis la milito, oni forprenis lin de la direktora posteno kaj faris lin simpla instruisto. La internulejo estis translokita for de la landlimo... Poste li revenis Moskvon kaj dum 1946-1948 instruis anglan lingvon en “Moskva porblindula lernejo”. En 1951 la sano de EROŜENKO draste malboniĝis. Anoncante la diagnozon “kancero”, la kuracisto ne povis supozi, ke tiu modesta paciento konas multajn lingvojn, kaj ankaŭ la latinan pere de Esperanto, en kiu estis dirita la verdikto...



ne kapablas digesti ilin. Ja por tio necesas pensi, rezoni, studi. Mi pensas, ke kapabloj por tiuj agoj poiom ŝrumpiĝas. Mezuri gradon de degradiĝo ne eblas, kaj mi pretas veti, ke nun okazas la degradiĝo.

8. Nia kulturo de akcelanta kontentigo de ĉiuj niaj bezonataĵoj kaj deziroj ne tre kontribuas al evoluo de obstineco kaj certeco.

9. Senco de la vivo estas difinata per tio, kiel vi uzas ĝin, kiel vi ĝin transformas. Iun alian sencon la vivo - ĉu homa, ĉu hunda, ĉu bakteria – simple ne havas. Vi mem decidis en kio estas senco de via vivo – sekve, vi almenaŭ parte regas ĝin. Se vi decidis: mi vivos por akumuli laŭeble multajn propraĵojn – do, en tio estas senco de via vivo. Necesus nur sincere kompati vin – sed, se okazis tiel, do estu tiele. Se vi decidis: mi vivos por amikeco, amo, interhelpo por homoj, kiuj strebas doni al si kaj la ĉirkaŭuloj laŭeble multe da ĝojo kaj feliĉo – sekve, ĝuste en tio estas senco de via vivo. Konsideru, ke forestas ajna flanka forto, kiu decidis pri tio anstataŭ vi.
10. Bezono mediti pri senco de la vivo, verŝajne, naskiĝas el nedeziro aŭ nescipovo mem mastri ĝin. Se vi konsideras vin kreaĵo de iuj eksteraj fortoj, destinita konstante ricevadi vangofrapojn de merkato, registaro, gepatroj-despotoj – de iu aŭ io ajn - vi komencas serĉi ion eksteran, flankan, kiu povas montri al vi veran sencon de via vivo. Sed se vi havas jam evoluitan normalan estimon al si mem kaj al la aliuloj, vi mem komencos krei sencon de via propra vivo.
11. **Hipokritulo estas tiu, kiu aplikas al aliuloj standartojn, kiujn li rifuzas apliki al si mem.**
12. Ni perdas la infanecon. Instruistojn oni katenas per instrukcioj. Infanojn oni katenas per testoj kaj ekzamenoj. Se tuta lernado celas preparon por ekzameniĝo, neniu ion ellernos. Ĉio dirita dum la ekzameno estos forgesita tuj post ĝi.
13. Psikoterapeŭtoj scias, ke kulposento similas al hokstango, per kiu eblas facile kroĉi eĉ la plej fortan personon. Posedanto de la hokstango, similas al flosanto kiu direktas la trabojn al necesa torento. Se amaskomunikiloj devigas homon kredi sian kulpon antaŭ ĉiuj malfeliĉoj kiuj ĉirkaŭas

kaj politikaj rajtoj. Memhumiliĝo instigas homon al apatio kaj malagemo.

14. Interreto ŝparas monon, interreto ŝparas tempon. Sed ĝi subpremas la interrilatojn. Mi memoras, kiam mi loĝis en iu urbeto, kaj tie la poŝtejo estis la interkomunikejo. Neniu liveris poŝtaĵojn, ĉiuj matene venadis tien, mem prenis la korespondaĵojn, kaj interkomunikiĝis.
15. La homa gento aĝas eble 100 milojn da jaroj kaj nuntempe ĝi travivas unikan tempon en sia historio. Tiu gento nun estas en stato, kiam ĝi sufiĉe baldaŭ, dum vivo de kelkaj generacioj, devos decidi, ĉu la eksperimento pri t.n. racia vivo daŭru plu, aŭ ni decidus ĝin neniigi.

El la rusa tradukis M.Lineckij

KLUBA VIVO


A.Wandel

La 15.02 vespere je la 21 horo la israela ŝtata televido elsendis 12-minutan programon pri Esperanto en Israelo. Ĝi estis filmita i.a. en la Tel-Aviva E-klubo, kiun vizitis tiufoje s-anoj de Serbio kaj Svislando, kaj en la du E-kursoj, instruitaj de Janaj kaj Eldad, kiuj estis plenplenaj. Cetere estis intervjuitaj s-anoj Amri kaj Tali Wandel, Doron Modan, Israela, kiuj rakontis pri siaj personaj spertoj.

La 11.03 en Tel-Aviva klubo okazis memorvespero omaĝe al la 15-a datreveno de la forpaso de Josef Murĵan. Ĉeestis pli ol 30 personoj inkluzive liaj filinoj kaj iliaj familioj.



Foto de A. Wandel



Josef Murĵan

edukado kaj instruado de blinduloj en tiuj landoj, esploris lokajn tradiciojn kaj folkloron, aŭdis popolajn legendojn. En januaro 1917 EROŜENKO venis en Birmon, kie oni proponis al li la direktoran postenon en porblindula lernejo, sed li malakceptis tion kaj laboris kiel simpla instruisto. La instruado en misiista kristana lernejo por birmanaj blindaj knaboj ludis gravan rolon por lia vivmaniero kaj posta verkado. Kun siaj lernantoj li vizitis plurajn antikvajn birmajn urbojn. Kiam la novaĵo pri la februara revolucio en Rusio atingis Birmon, EROŜENKO altiris al si atenton de la registaro: oni komencis observi lin. En septembro EROŜENKO forveturis al Hindio (jam la duan fojon), esperante de tie reveni al Rusio, sed la registaro malpermesis al li foriri el la lando kaj eĉ forlasi la hotelon, kie li loĝis. Tamen Vasilij vojaĝis tra la lando, esplorante Hindion kaj registrante (angle) hindajn legendojn. Post kelkaj monatoj oni arestis lin en Kalkato, kie li provokis sian ekzilon: li kantis la “Internacion” eble la plej revolucionan kanton en kinejo, tradukante la vortojn en la bengalan. La rezultoj estis antaŭvideblaj: oni ekzilis EROŜENKO-n kiel bolŝeviston ekster la limojn de la Brita Imperio. Helpe de siaj esperantistaj amikoj li revenis al Japanio. Tie li daŭrigis tre aktivan soci-revolucion vivon. En majo 1921, post la malpermeso de la Socialisma Ligo de Japanio, EROŜENKO estis arestita (tio estis jam la dua aresto en Japanio). Somere de 1921 jaro li estis elpelita el Japanio. Jam post tio en Japanio aperis tri volumoj de lia verkaro japanlingve: “Kanto antaŭ tagiĝo” (1921), “La lasta ĝemo” (1921), “Por la homaro” (1924). Interna milito tiutempe skuis ankaŭ orient-

azian Rusion, kaj oni ne enlasis EROŜENKO-n en lian patrujon (tamen li mirakle evitis areston!). Do, li vojaĝis al Ĉinio. En Ŝanhajo oni invitis lin instrui en la E-a Instituto de Mondaj Lingvoj. Ankaŭ tie li multe verkis en Esperanto. En oktobro 1921 aperis literatura aldonaĵo al pekina gazeto, plene dediĉita al la vivo kaj verkoj de EROŜENKO. Danke al tio, la fama ĉina poeto Lusin ekinteresiĝis pri li, kaj ĝis la fino de lia vivo ili restis amikoj malgraŭ distancoj kaj ofte sen ajnaj ebloj interkomunikiĝi... Lusin faris multon por Vasilij EROŜENKO: li ne nur tradukis liajn verkojn en la ĉinan, sed ankaŭ rekomendis lin al rektoro de la Pekina Universitato. Tie EROŜENKO dum kelka tempo instruis Esperanton kaj rusan literaturon. La 14an

de arabaj fabeloj povus fari por mi pli ol la geniulo de reala vivo Doktoro Zamenhof, kreinto de Esperanto", skribis EROŜENKO en la skizo "La unua eksterlanda vojaĝo de la blinda esperantisto s-ro V. Eroŝenko". Eble jam tiam li decidis vojaĝi al Japanio. Li do revenis hejmen kaj prepariĝis por la vojaĝo: studis la japanan, korespondis kun esperantistoj de Japanio, Koreio, Birmo. Eble li sciis, ke en Japanio blinduloj ĝuas grandan respekton, kaj ekde antikva tempo ili havas monopolan rajton ludi kotoon kaj ŝamisenon kaj praktiki masaĝon. Krome, ankaŭ Esperanto en la Oriento tiutempe ĝuis grandan favoron kaj respekton. EROŜENKO atingis Tokion aprile 1914, perŝipe el Vladivostoko. Tie lin renkontis kaj gastigis NAKAMURA Kijoo - membro de la Imperia Akademio de Sciencoj kaj ankaŭ esperantisto.

En la Tokia lernejo por blinduloj Vasiliĵ studis: masaĝon, la japanajn lingvon kaj literaturon kaj muzikon. Speciale por EROŜENKO oni invitis instruiston de masaĝo. La japanan literaturon instruis profesoro, kiu scipovis la rusan. Dum sia restado en Japanio, EROŜENKO estis tre aktiva: li partoprenis en diversaj societoj (ofte radikalaj anarhiistaj), instruis Esperanton multe prelegis (ofte kantante rusajn kantojn dum prelegoj) ktp. Jam en januaro 1916 oni publikigis liajn rakontojn (la unua "Rakonto de lanterno" estis verkita post nur 1,5 jaroj da restado en Japanio). Li interesiĝis ankaŭ pri bahaismo: li tradukis el la angla en Esperanton "Kaŝitaj vortoj de Baháulláh". Per ideoj de bahaismo estis trikitaj ankaŭ la tiutempaj prelegoj de EROŜENKO.

El la leteroj de EROŜENKO: "Pasintdimanĉe mi havis strangan humoron: mi volis flugi en aeroplano, kaj mi iris al la fama usonano SMITH kaj petis lin preni min, sed li rifuzis plenumi mian peton. Li diris, ke en Japanio li ne prenas pasaĝerojn... Mi devas kiel eble plej baldaŭ foriri de Japanio, sed pluraj baroj tenas min, kaj eble mi restos ĉi tie ankoraŭ kelkajn monatojn... Tre ofte mi volus havi kronon nur por povi ridante meti ĝin al la piedoj de preterpasantoj. Kiel ofte mi ŝatus esti en la paradizo, kun dioj kaj anĝeloj nur por rifuzi firmamentajn ĝuojn kaj aliĝi al suferantoj, flamantaj en la iama fajro..." (aprilo 1916).

La trian de julio 1916 li forlasis Japanion, kaj komenciĝis liaj vojaĝoj tra Sud-Orienta Azio: Siamo (la nuna Tajlando), Brita Birmo, Hindio... Vasiliĵ EROŜENKO lernis lingvojn, ekkonis la staton de

**"Se vi forestas, sekve forestas ankaŭ mi" -
foje en porinfanaj fabeloj estas pli da senco ol
al vi povas ŝajni...**

**Iam vi ĝiskreskos tiun tagon, kiam vi denove
eklegos fabelojn.**

Kompilis kaj tradukis M.Lineckij

Sube estas diafane kortuŝa dialogo el animacia filmo "Erinaceto en nebulo". La reĝisoro estas Jurij Norŝtejn.

La filmo estis produktita en tiama Sovetio en 1975 kaj ĝi ricevis preskaŭ 40 distingojn en diversaj festivaloj de animaciaj filmoj.

Do, agordu vin al reveno en infanecon...



Jurij Norŝtejn

Tiel estis ĉiun vesperon en tiu klara malvarma aŭtuno. Ĉiun vesperon Erinaceto kaj Ursido kunvenadis jen ĉe Erinaceto, jen ĉe Ursido kaj pri io parolis. Jen, ankaŭ hodiaŭ Erinaceto diris al Ursido:

- Tamen estas tre bone, ke ni amikas unu kun la alia.
- Ursido kapjesis.
- Vi nur imagu: mi forestas, vi sidas sola kaj ne estas kun kiu paroli.
- Kaj kie estas vi?
- Kaj mi forestas.
- Tiel ne povas esti, - diris Ursido.
- Ankaŭ mi tiel opinias, - diris Erinaceto. - Sed estas jene - mi tute forestas. Vi estas sola. Nu kion vi faros?
- Mi iros al vi.
- Kien?
- Kion signifas "kien"? En vian hejmon. Mi venos kaj diros: "Kial vi ne venis, Erinaceto?", kaj vi diros...
- Stulteta vi estas. Kion povos diri mi, se mi forestas?
- Se vi ne estos hejme, do vi iris al mi. Mi kuros al mia hejmo. Ha-a, vi estas ĉi tie! Kaj mi komencos...
- Kion?
- Kvereleti!
- Pro kio?

- Kion signifas “pro kio”? Pro tio, ke vi ne faris tiel, kiel ni interkonsentis.
- Kaj kiel ni interkonsentis?
- Ĉu mi scias? Ja vi devas esti aŭ en mia, aŭ en via hejmo.
- Sed mi tute forestas, ĉu vi komprenas?
- Tiukaze vi iris ien kaj ankoraŭ ne revenis. Mi kuros, traserĉos tutan arbaron kaj trovos vin!
- Vi jam ĉion traserĉis, - diris Erinaceto. – Kaj ne trovis.
- Do, mi kuros en la najbaran arbaron.
- Ankaŭ tie mi ne estas.
- Mi traserĉos ĉion-ĉion kaj vi troviĝos.
- Forestas mi. Estas nenie.
- Tiam, tiam... Tiam mi kuros en kampon, - diris Ursido, - kaj forte ekkrios: “Er-i-i-ina-a-a-c-e-e-eto!” kaj vi ekaŭdos kaj reeĥos: “Urs-i-i-do-o”. Jen tiel...
- Ne, - diris Erinaceto. - Mi tute forestas, sen eĉ eta ero. Ĉu vi komprenas?
- Kial vi molestas min? – kolere diris Urseto. - Se vi forestas, sekve forestas ankaŭ mi. Ĉu vi komprenas?
- Mi nepre, ĉu vi aŭdas min? Mi nepre, - diris Ursido. Erinaceto kapjesis.
- Mi nepre venos al vi, ajnokaze. Mi apudos vin ĉiam. Erinaceto rigardis Ursidon per mildaj okuloj kaj silentis.
- Kial do vi silentas?
- Mi kredas, - diris Erinaceto.



- Kaj kiel ni interkonsentis?

Kiel mi promesis en la antaŭa numero, mi proponas por via atento materialon pri homo, kiu havis unikajn vivon kaj sorton.

La redaktanto.

FLAMANTA SORTO DE VASILIJ EROŜENKO

Julia PATLAN, estro de la

Internacia scienca esplora grupo

“Vasilij Eroŝenko kaj lia tempo”, Ukrainio

Foje EROŜENKO diris al homo perdinta vidkapablon en milito: “Mi nebule memoras nur kvar aferojn: ĉielon, kolombojn, preĝejon, kie ili loĝis, kaj la vizaĝon de la patrino. Ne tro multe...” La blindeco de EROŜENKO ne malhelpis al li travivi vere legendan vivon. La unuaj esploroj pri la vivo kaj verkoj de EROŜENKO komenciĝis en lia patrujo kvin jarojn post lia forpaso, sed jam dum preskaŭ 20 jaroj funkcias “Internacia scienca esplorgupo pri Eroŝenko” kaj agas nun fruktodone.



Vasilij Eroŝenko
1890 - 1952

Vasilij EROŜENKO naskiĝis en sloboda Obuĥovka de la Kurska provinco kaj blindiĝis estinte 4-jara. Li lernis en “Moskva porblindula lernejo”. Post fino de la lernejo, EROŜENKO ludis violonon en blindula orkestro en moskvaj restoracioj. Tiam li konatiĝis kun Anna ŜARAPOVA - instruistino de la angla kaj propagandistino de Esperanto. Tiu renkontiĝo fariĝis vere destina en lia vivo. Ŝi informis lin pri la Reĝa Kolegio kaj Akademio de muziko por blinduloj apud Londono, kaj ke tie li povas plustudi. Tre baldaŭ EROŜENKO flue regis Esperanton, kaj ŜARAPOVA preparis lin por la longa voj-aĝo. En 1912 en la revuoj “Slepec” (Blindulo) kaj “Vokrug Sveta” (Ĉirkaŭ la Mondo) aperis artikolo “Vojaĝo de rusa blindulo al Londono”. Tie ŜARAPOVA skribis, ke 22-jaraĝa Vasilij EROŜENKO... tiel profunde ellernis Esperanton ĉefe danke al brajla angla-esperanta vortaro, londonaj revuoj, libroj kaj korespondado kun esperantistoj de Anglio, ke li rapide ellernis ankaŭ la anglan. “La lampo de Aladeno ne povus helpi al mi pli, ol la verda esperantista steleto; mi estas certa, ke neniu geniulo

Akiva Jaakov Ettinger (1872-1945). Li estis agronomo, aktivulo en la hebrea setleja movado. En 1898 Ettinger estis invitita de Juda Koloniiga Societo, kiel eksperto pri laboro por subteni hebreajn agrikulturajn setlejojn en Ukrainio. Ekde printempo 1914 li la –boris kiel ĉefagronomo kaj inspektisto de hebreaj agrikulturaj setlejoj en Erec-Israelo. Sur ŝtoneca tero de Judeaj Montoj li fondis setlejon Kiriāt-Anavim, kiu fariĝis modelo por fondo de la sekvaj setlejoj en montaraj terenoj. Li insistis pri neceso krei miksitajn mastrumejojn, kiuj unuigas agrikulturon kun laktprodukta bestobredado, enkondukis progresivajn metodojn de arboplantado.

Aĥad-ha-Am (Aŝer Hirŝ Ginberg) 1856-1927. Li naskiĝis en urbeto Skvira, en riĉa ĥasida familio. Kiam li estis 8-jara, li laŭvoje el ĥeder hejmen de la stratŝildoj komencis lerni kirilajn literojn. Poste same kaŝe li lernis algebron. La avo, rimarkinte tion, konsiderante algebrajn signojn kiel sorĉaj, malpermesis al la nepo okupiĝi pri tio. Aŝer malamis tiun vivmanieron kaj revis forlasi tiun malvastan kaj sufokigan mondeton. De 1884 li ekloĝis en Odeso, kie li studis filozofion, la anglan kaj la francan. La modesta provinculo fariĝis fama hebrea aganto, kaj en la palestinofila socio havis gravan rolon. En 1889 li fondis societon “Bnej Moŝe” (“Filoj de Moseo”) kaj komencis eldoni gazeton “Ha Ŝilloaĥ” por restaŭri hebrean kulturon kaj spiritan esencon de judismo.

Praktikaj atingoj de la ordeno “Bnej Moŝe” estis en organizo en Erec-Israel, kaj en aliaj landoj studejoj, kiuj donadis laikecan kleron en la hebrea; en helpo fondi la urbon Reĥovot, kaj lanĉo de eldonejo “Aĥiasaf”.



Estimataj legantoj, la daŭrigon de la artikolo, en kiu vi renkontiĝos kun multaj konataj por vi homoj, legu en la sekva numero de nia revuo.

La redaktanto.

Tra stratoj de urboj ofte pasadis modestaj, ne tre bone vestitaj homoj per kies nomoj, kiam ili mortos, la posteuloj nomos tiujn stratojn. Ili travivis mokojn, indiferenton, centojn da malsukcesoj, tortutrojn kaj malsaton - kaj nun, antaŭ iliaj okuloj realiĝis la unuaj paŝoj, efektiviĝis la plej antikvaj aŭguroj...

Zeev Ĵabotinskij

Ni sekvu vojojn de tiuj homoj, kiuj ekveturis el Ukrainio al la Sankta Tero establi la ŝtaton Israelo kaj ni provu konscii, dank'al kiaj streĉoj ili sukcesis realigi 2000-jaran revon de la juda popolo.

KONTRIBUO DE UKRAINIDEVENAJ JUDOJ **POR ESTABLO DE ISRAELO**

M.Lineckij,
la kompilo kaj traduko,
farita surbaze de la samtitola libro.

Sur ukraina tero dum jarcentoj vivis popolo, kies revo estis renkontiĝi “sekvajare en Jerusalemo”. Apud ili estis homoj, revantaj pri kreo de sendependa ukraina ŝtato. Hodiaŭ tiuj revoj fariĝis realo. La ŝtatoj Israelo kaj Ukrainio ekzistas!

Ni konatiĝu kun tiuj historiecaj homoj...

En ukraina tero estas tomboj, kiuj fariĝis pilgrimlokoj por judoj el la tuta mondo...

Tombo de fondinto de ĥasidismo Baal Ŝem Tov estas en urbeto Meĵiboj; fondinto de ĥasid-movado Ĥabad Rabbi Ŝneur Zalman bar Baruĥ dormas eternan dormon en la urbo Gadjaĉ. “Granda patronanto” Levi Jiĉĥak atendas siajn adeptojn en Berdiĉev kaj rabeno Naĥman - en Braclavo kaj Uman’.

Kiam fondinto de ĥasidismo rabeno Israel Baal Ŝem Tov eksciis, ke rabeno Ĥaim ben-Atar lokiĝis en Jerusalemo, ankaŭ li decidis veturi tien, ĉar li estis certa: se ili renkontiĝos sur Israel-Tero, tien nepre venos la Mesio. Trifoje ekveturis Baal Ŝem Tov en Israelon, trifoje haltigis lin voĉo de ĉielo: Anko-raŭ ne tempas”...




Rabeno Naĥman el Braclavo.

En la 1798 ekvojis pranepo de Baal Ŝem Tov, rabeno Naĥman el Braclavo. En Jerusalemo li studis kabalon, viztis tombojn de judaj sciencistoj, preĝis. La vojaĝo ege impresis lin. Reveninte en Ukrainion al siaj adeptoj, rabeno Naĥman malpermesis konservi ion ajn el sia antaŭa instruo: “Ĉio, kion mi predikis antaŭ mia veturo en Erec-Israelon, havas tute neniun signifon”.

Ŝneur-Zalman.

Meĵiriĉ (Interriverejo) - nun estas urbo en Rivne-provinco. Tie Maggid anoncis junan Ŝneur Zalman “lucerno de Israelo” kaj komisiis al li reskribi Kodekson de Juda Leĝo (“Ŝulĥan Aruĥ”), enkludinte en ĝin plej novajn decidojn de rabenoj. Li okupiĝis pri kolektado kaj ĝiro de mono por malriĉaj judoj, vivantaj sur la Sankta Tero. Tio estis kaŭzo por denunco, aresto kaj enprizonigo en Petropaŭla fortikaĵo, el kiu li estis mirinde liberigita.



En la urbo Gadjaĉ apud lia tombo estas konstruita sinagogo

Judoj de Pollando, Litovio kaj Ukrainio kolektis oferdonojn por ke la samideanoj povu aĉeti teron en Erec-Israelo.

“De infanaĝo mi memoras bluan ladan monkolektujon, kiu staris en nia gastoĉambro apud la sabataj kandeloj, en kiun ne nur ni, sed ankaŭ niaj gastoj ĉiusemajne metis monerojn; simila blua monkolektujo estis en ĉiu juda domo, kiujn ni vizitadis” (Golda Meir)

En ĉiu sinagogo, praktike en ĉiu juda domo estis kruĉoj de “Rabeno Meir-miraklofaranto” por kolekti monon, - laŭ proksimuma kalkulo da ili estis pli ol 200 miloj. Tio estis vere popola kutimo: eĉ malriĉulo en mizereca juda urbeto ĵetis en la kruĉon sian kopekon kaj nenielokaze elprenis ĝin de tie. Metante en la monkolektujon sian kontribuon multaj komprenis, ke, plej verŝajne, ili neniam vizitos Erec-Israelon, - la teron oni elaĉetadis por la estontaj generacioj.

Kontraŭjudaj pogromoj en 1881-1882 jaroj frakasis esprojn de centoj da junaj judoj pri normala vivo en Rusia Imperio. Eĉ la agnoskitaj kleruloj, profesiuloj subite eksentis, ke ili restas fremduloj en tiu lando. La 18-an de ja-nuaro 1882, en kulmino de la pogromoj, en sinagogoj de la Imperio kolektiĝadis judoj— riĉaj kaj malriĉaj, famaj kaj

distrikto de la urbo Ĥadera).

Cederbaum Aleksandr (1816-1893). Li devenas de neriĉa familio de horloĝisto, ekde 1840 loĝis en Odeso. Li aktive partoprenis en agado de la juda societo kaj fondis judan lernejon. A.



Cederbaum klopodis por ricevi permeson eldoni hebrelingvan ĵurnalon. En 1860 aperis la unua numero de semajna eldonaĵo “Ha-Melic”. En la suplemento en la jida “Kol Mevasser” debutis estontaj famaj poetoj kaj verkistoj: A.Glotberg, A.Goldfaden, Ŝ.Abramoviĉ (Mendele Moĥer Sforim),



I.Gordon, I.Lineckij, M.Lilienblum...

Tjemkin Vladimir (Zeev) (1861-1927).

Naskiĝis en Jelisavetgrad (poste Kirovograd, nun - Kropivnickij) kaj ekde 1891 gvidis palestinan administracion en Jaffo. Li estis inicianto de amaso da terparceloj por koloniigo. Araboj nomis lin “ras el-jehuda” (“gvidanto de judoj”). Dum 2,5 jaroj li sukcesis aĉeti la parcelojn en Jezreela valo, en la valo Ĥefer kaj norde de Kinereto. Tiun tempon oni nomis “epoko de Tjemkin”.



Kirjat-Anavim (vinbera urbeto). Kibuco 10 km okcidente de Jerusalemo. Ĝi estis fondita en 1920 de judoj, venintaj el Ukrainio, al kiuj poste aliĝis repatriuloj el Pollando, Germanio kaj Argentino.



Jehoŝua Ĥankin (1864-1945). Filo de Jehuda Ĥankin. Pro aktivado de la junulo pri revoluciaj ideoj, la gepatroj decidis forveturi el Rusio. Li havis en tiu momento 17 jarojn. Li kun la patro okupiĝis pri laboroj en kampo kaj poste li dediĉis sian vivon al sola celo - “geulat ha-karka” - savo de tero, ĉar en la Torao estas skribita: Dio ordonis al filoj de Israelo “savi” ĉi teron.

Dum preskaŭ 50 jaroj aĉetadis parcelojn en Erec-Israelo. Por aĉeti teron en Jezreela valo li traktis la aferon dum 20 jaroj kaj elaĉetis pli ol 120 000 dunamojn (10 dunamoj=1 hektaro). Granda tempo kaj multe da fortoj estis elspezitaj por aĉeti laŭmaran strion de Ĥajfa ĝis Akko. Bedaŭrinde li ne ĝisvivis 3 jarojn ĝis kreo de la ŝtato Israelo...



Olga Ĥankin-Belkind (1852-1942). De la junaĝo ŝi revis fariĝi akuŝistino, sed por tio necesis studi en speciala kurso, kiu estis nur en Peterburgo. Sed por judoj, kiuj estis devigitaj esti en limoj de permesita fiksloĝado, tio estis nur revo. Tamen la miraklo okazis - ŝi trafis al Peterburgo, kie aktive studis kaj laboris, aliĝis al “Societo por disvastigo de klereco”. Olga Belkind venis en Palestinon laŭ peto de la patro, por helpi al la fratino. Olga komprenis, ke ŝi ĉi tie estas tre bezonata kaj restis en Riŝon le-Ciono.

Ŝi konatiĝis kun Jehoŝua Ĥankin kaj admiras liajn certecon, aktivecon, junulan entuziasmon, kaj konsentis esti lia edzino. Ekde tiam saĝeco, taktemo, talento kaj bonega scipovo de la franca de Olga estis direktitaj por helpo al la edzo. Tio tre helpis al li plenumi sian mision, dank'al kiu la eksgimnaziano el



Kremenĉug fariĝis unu el la gravaj personoj en historio de la ŝtato Israelo. En la 1927 jaro Jehoŝua fariĝis reprezentanto de cionisma estraro en Palestino, en 1932 - direktoro de terkorporacio de Palestino, en 1934 li fariĝis honora urbano de Tel-Aviv. Dubindas, ĉu li sukcesus atingi ĉion, se apud li ne estus fidela amiko Olga. Nomon de Jehoŝua Ĥankin havas moŝavo (kooperativeca vilaĝo) Kfar Jehoŝua, stratoj en Afula kaj Ĥajfa. Pernomo de Olga estas nomita loĝloko Givat-Olga (nun




Jehoŝua kaj Olga

por neniu konataj, legis “sliĥotojn” - pentopreĝojn...

Tiun tagon ankaŭ en sinagogo de urbo Ĥarkivo preĝis judoj. Venis eĉ junuloj el asimilitaj familioj, kiuj dum jaroj ne venadis tien. Post la preĝo studento Israel Belkind invitis en la hejmon la junularon. En la loĝejo kolektiĝis ĉ. 30 homoj: gimnazianoj, studentoj, laborantaj junuloj... Ili akceptis decidon veturi al Erec-Israelo por kulturi la teron kaj prepari lokon por tiuj, kiuj sekvos ilin. La rondeton oni nomis BILU - laŭ la unuaj literoj de slogano en ivrito el libro de profeto Jeŝaja “Bejt Jaakov leĥu venelĥa” - “Domo de Jaakov, ni leviĝu kaj ekiru”.

La unua grupo da BILU-anoj kolektiĝis en Odeso por la ekveturo. Antaŭ la forveturo estis publikigita deklaro, en kiu temis, ke ili promesas dum tri jaroj labori en agrikultura komunumo - “ne por la pliriĉiĝo, sed por bono de la popolo”.

“Nur biluanoj estis veraj judaj pioniroj, kiuj ekvojis por propramane krei sian kaj ĝeneralpopolan aferon sur kampoj de Palestino”.



Israel Belkind

Josif Trumpeldor

“Heĥaluc”, ĝia esenco kaj la proksimaj taskoj.

Ĥaim Ĥisin - Julie de 1882 li en grupo da BILUanoj, sub gvido de I. Belkind li venis en Erec-Israelon. Komence li laboris en agrikultura lernejo “Mikve Israel”, poste kiel agrikultura dunglaboristo en Riŝon le-Cion. En 1884 li estis en grupo, kiu fondis Gederon - la unuan en Israelo setlejon de repatriintoj el Rusia Imperio. “Doktoron Ĥisin ni renkontis kun granda ĝojo. Li estis svelta, tre agrabla homo, bonkora kaj ŝercema. En lia buŝo ĉiam estis fumanta pipo. Super blanka kapo de la azeno <...> tra dikaj, glacisimilaj lensoj de la okulvitroj rigardis ofte palpebrumantaj saĝaj okuloj de la dokto-ro...” (El rememoroj de pentristo N. Gutman.)

Poste Ĥisin forveturis en Rusian imperion, studis farmokologion en Ĥarkivo, laboris kiel apotekisto en Odeso, studis medicinon en Svislando, en 1905 li revenis en Erec-Israelon kun la edzino kaj 5 infanoj. Li estis unu el la fondintoj kaj unu el la unuaj urbanoj de Tel-Aviv, komitatestro de rusi-palestina societo. Kun lia helpo ape-




Ĥaim Ĥisin

ris setlejoj Beer Jaakov, Ejn-Ganim, Naĥalat-Jehuda, Kfar-Malal.

Ĥ.Ĥisin fondis hospitalon en Tel-Aviv kaj al la malsanuloj li ofte veturadis sur azeno.

Fanja Frizer el Kerĉ (Krimeo), studis kantan en Moskvo, aniĝis en BILU-societo, venis en Erec-Israelon kaj edziniĝis al Ĥ.Ĥisin. Tiun vesperon la fianĉo revenis de la kampo, nutris mulojn, lavis sin, ŝanĝis la ĉemizon kaj iris al supro de monteto apud Riŝon le-Cion, kie sub malnova figarbo faris ĥupon - nuptan baldakenon. En 1914 ŝi veturis en Rusion viziti la parencojn, sed komenciĝis la Unua Mondmilito, Oktobra revolucio... Fanja revenis nur post 5 jaroj tute malsana kaj forpasis en la 1920. Ĥaim Ĥisin supervivis ŝin je 12 jaroj.



Fratoj Josef, Israel kaj Boris Fajnberg. Ili forveturis en Palestinon en 1882 el Sevastipolo. Tie ili strebis maksimume uzi ĉion, kion ili vidis dum restaŭro de Sevastopolo post la Krimea Milito.

Josef Fajnberg (1855-1902). Naskiĝis en Sevastopolo, studis kemion en universitatoj de Svislando kaj Germanio. Laboris en sukerproduktaj uzinoj en Ukrainio. Printempe de 1882 li venis en Jaffon kaj komencis labori en Riŝon le-Cion. En la unua jaro de ekzisto de Riŝon le-Cion la setlanoj tre bezonis urĝan helpon. En serĉado de financoj estis decido sendi iun en Eŭropon. Estis lektita J.Fajnberg - li estis bonklera homo, parolis kelkajn lingvojn, estis ĝentila, agrabla kaj bela - kiel vera eŭropano. En la 1883 jaro li renkontiĝis en Parizo kun barono Edmond Rotŝild. Josef diris al li: "Esenco de nia ideologio - renesanco de Israelo sur tero de niaj prauloj".

La barono respondis per frazo el la Biblio: "Eliĝis flamo el koro de heroldo de Supera Graco kaj ĝi eniris en koron de anĝelo de futuro".

La unua "kotizo" de la barono estis serioza sumo - 25 mil frankoj. Unuavice la setlanoj aĉetis instalaĵon por fosi puton. Nur en profundo de 45 metroj estis trovita la fonto. Tio estis ĝoja tago por la urbanoj. La puto ekzistas ĝis nun. Ĝi fariĝis emblemo de la urbo kaj havas nomon de Josef Fajnberg.



La frazo "Macanu maim!" - "Ni trovis akvon!" kaj la puto mem estas sur blazono de Riŝon le-Cion. Nun la urbo estas la kvara en Israelo laŭ la grandeco, havanta preskaŭ 230 mil loĝantojn.



Israel (Lulik) Fajnberg (1865-1911).

En la jaro 1882, sekvante la pliaĝan fraton Josif, li venis en Riŝon le-Cion-on. Deksepjara Israel montris sin forta, fidinda junulo. Li kontaktiĝis kun felaĥoj kaj beduenoj, studis ties lingvojn kaj kutimojn. Pro lia lerteco kaj impeteco oni nomis lin "Lulo" - perlo. La alnomo "Lulik" gluiĝis al li por ĉiam. Kiam plioftiĝis raboj kaj atakoj de latronoj sur la vojoj, Lulik organizis defendon de la vojaĝantoj kaj per propra kuraĝo inspiradis la kamaradojn.

Menaŝe Meiroviĉ (1860-1949). Li naskiĝis en Nikolajevo kaj en la aĝo 22 jaroj fariĝis unu el tri por tuta Rusia imperio juda agronomo. En 1883 li venis en Jaffo-n kaj aliĝis al BILU. Lian subskribon eblas vidi sur la Statuto por fondi Riŝon le-Cionon. Krome li estis unu el fondintoj de la israela vinproduktado.

Jehoŝua Osevickij (1858-1929) . Li naskiĝis en Kijiva provinco en familio de rabeno. En 1882 li venis en Erec-Israelon kiel instruisto en agrikultura lernejo "Mikve Israel". Post du jaroj li veturis en Parizon kun rekomendletero al mem Rotŝild li veturas al Parizo. En la 1884 li revenas el Francio kiel reprezentanto de la barono en Riŝon.

Boris Osevickij. Li ekgvidis la unuan judan orkestron en Erec-Israelo en tiu periodo. Laŭ la profesio li estis muzikinstruisto, sed perfekte li posedis sekretojn de vinfarado. Li laboris en vinproduktejo "Karmel Mizraĥi", kiu fariĝinta fama.

Jehuda Lejb Ĥankin (1842-1894). Li loĝis en urbo Kremenĉugo, kie li sukcese okupiĝis pri terkulturado. En la 1882 jaro li kun la edzino kaj sep infanoj venis ŝipe al Jaffo. La familio estis en Riŝon le-Cion inter la unuaj loĝantoj. Jehuda estis instruisto de la setlanoj pri terkulturado.